




Nº 11 - JAN / 84

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto
Praça da República 54-20 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ
BRASIL (Tel: 2326309)



IMPRESSO

PRI NIAJ INFORMILOJ

En la komenco de la pasinta jaro, kiam ni aperigis la unuan numeron de BEL-INFORMA; ni skribis, ke "ĝi konsistas nur el pli ofta kaj malplikosta informilo, kiun ni klopod s sendi al vi ĉiumonate". Krome, ni riskis diri ke, neniu dubos pri ĝia taŭgeco, ĉar pere de ĉi tiu dupaĝa bulteno ni sukcesus transdoni al vi, ĝustatempe, la plej urĝajn informojn, kiujn vi bezonus por aktive partopreni en nia movado kaj por pli bone kompreni ajn malfacilaĵojn kaj niajn sincerajn klopodojn.

Sajnas al ni ,ke almenaŭ rilate al INFORMADO , ni plenumis nian taskon , pli bone

ol antauvidite.

Dum la jaro 1983 ni sukcesis eldoni 10 numerojn de BEL-INFORMAS; 13 numerojn de ESPERANTO NOTICIAS kaj 4 numerojn de BRAZILA ESPERANTISTO. Krome, ni disaudigis 43

kvinminutajn radiprogramojn pri nia movado.

Fakte, ni plenumis la taskon (eldoni kaj dissendi informojn) kaj atingis la celon (informadi la esperantistan kaj neesperantistan publikon), sed ni dubas pri la rezulto de tiu peniga kaj multekosta laboro. Ĉu nia membraro kreskis, dank'al tiu informado? Ĉu tiu eventuala kresko okazis proporcie al nia penado? Ĉu valoras la penon daŭre elspezi tiom da mono por tiaj malgrandaj rezultoj? Kio mankas? Kial tiom da esperantistoj rifuzas membriĝi al nia Asocio? Antaŭnelonge oni plendis pri manko da informiloj, ĉefe pri la neatendita malapero de la tradicia revuo BRAZILA ESPERANTISTO. Kelkaj lasis la movadon pro la tiama malunueco reganta en nia lando. Kaj nun? Kiaj estas la argumentoj kontraŭ la membriĝo al BRAZILA ESPERANTO-LIGO? Ĉo se oni ne simpatias kun iu ajn estrarano de BEL, oni ne rajtas resti ekster ĝia membraro. Kiam oni membriĝas al la landa asocio, ni estas Kelpantaj la movadon, ne la gvidantoj de la societo.

Ni tre bedauras, kiam ni ricevas leterojn de brazilaj esperantistoj kun informpetoj pri jarkotizoj de UEA kaj abono de eksterlandaj revuoj, kaj ni konstatas, ke tiu esperantistoj delonge ne plu apartenas al nia Ligo. Kompreneble, se ili aliĝus al ĝi, ili estus bone informitaj pri tiuj aferaj. Almenaŭ dum 1983, ni sukcesis transdoni tiajn informojn ĝustatempe. Se vi relegos la numeron 10, de BEL-INFORMAS (Oktobro/83), ekzemple, vi konstatos, ke de longe ni publikigis la jarkotizojn kaj abonkotizojn por BEA. HEROLDO kaj EL POPOLA CINIO, sed ni daure ricevas informpetojn pri ili.

Ni esperas, ke en 1984, eĉ se ni decidos ne plu aperigi ĉi tiun bultenon ĉiumonate,

či estu eldonita laubezone.

INFORMOJ PRI AKTUALAJ ADRESOJ DE GESAMIDEANOJ

Se vi havas iun informon pri la aktualaj adresoj de la jenaj gesamideanoj, bonvolu sendi ĝin al BRAZILA ESPERANTO -LIGO, kiel eble plej baldau. Ni antaudankas vin pro tiu kunlaboro:

S-ino Maria Salomé Coutinho, F-ino Luisa Maria Coutinho, S-ro Hugo Ramos Filho F-ino Solange Garcia dos Reis.

NIA VARBADO POR UEA- 1983

Dum la finiginta jaro, BEL sendis al UEA 23 spezfoliojn koncernajn al 1983. Jen la ciferoj pri nombro da kotizoj kaj da abonoj senditaj al ĝi, laŭ kategorioj:

MJ	MA	MJ(K)	MA(K)	INDIVIDUAJ
				MEMBROJ
7	141	4	17	169

SZ	PT	SA	KTO
1	3	11	28

Legendo: MJ=Nembro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron)

MA=Membro Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto)

MJ(K)=Membro kun Jarlibro, ĝis inkluzive 25-jara(estas automate mombro de

TEJO kaj ricevas senpage la revuon Kontakto)

MA(K)=Membro-Abonanto gis inkluzive 25-jara(estas automate membro de JO

kaj ricevas senpage la revuon Kontakto)

TEJO: Tutmonda Esperanta Junulara Organizo

SZ=Societo Zamenhof(kroma financa apogo al UEA, aldone al la koti o)

PT=Patrono de TEJO (helpo al TEJO)

SA=Simpla Abonanto(ricevas nur la revuon Esperanto)

Kto=Kontakto(ricevas nur la revuon Kontakto).

Ni bone konscias pri la situacio de nia lando, rilate al la nombro da indivi aj membroj de UEA. Kompreneble, la malgrandigo de tiuj ciferoj dauros dum la jaro 1634, ne pro la kriterioj adoptitaj de BEL kaj KKE, koncerne al la kalkulado de la kr zejraj ekvivalentoj por UEA-kotizoj, sed pro la financa nacia krizo.

Spite niaj oftaj kaj lacigaj klarigoj, kelkaj samideanoj ankoraŭ miskomprenas la aferon kaj argumentas, ke la perantoj devus akcepti la konverton de la gulcenoj, rekte al kruzejroj, anstataŭ tiuj kalkuloj rilataj al internaciaj respondkuponoj, pri

kiuj ni jam skribis plurfoje (vidu BEL-INFORMAS N-RO 10/83).

Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenis la problemon, ni sugestas la legadon de la je-

nan tekston:

. Imagu, ke vi deziras membriĝi al UEA, kiel MA (Membro-Abonanto). Lau la UEA-tabelo, vi devas pagi, por tiu kotizo 40,00 guldenojn. Do , la peranto devas sendi al UEA 40 guldenojn, minus 10% an makleraĵon. Por sendi tiun monon, la peranto deva ačet, tiun eksterlandan monon, lau aktuala kurzo, kaj pagi al la banko la ekstraj: kruze rojn koncernajn al tiu-servo kaj al devigaj impostoj (53% de la guldenoj se dotaj + 15 dolaroj + proksimume (2.000,00). Tiun operacion la peranto faras, nur kiam esțas sufice da abonantoj au kotizantoj. Kompreneble, Li ne povas fari tion, tuj kiam li ricevas la aligilon de iu ajn interesito, ĉar li bezonas arigi plurajn aligilojn por malgrandigi la operacian koston. Do, kiam la interesito skribas al la peranto, la prezo de la guldeno(kurzo) valoras "x". Kiam la letero alvenas al la manoj de la peranto, la guldeno ne plu valoras "x", sed "y". Fine , kiam la peranto sukcesas arigi kelkajn aligilojn kaj iras al la banko por aĉeti la guldenojn, eble ili valoros "z". Kiu povas garantii, ke inter la sendado de la ĉeko de la interesito kaj la aĉetado de la guldenoj per la peranto ne okazos iun "grandegan malvalorigon de nia malforta valuto? Eĉ se ne okazus grandegan malvalorigon, almenaŭ okazus malprofiteton. Kaj tio estas tute nekonvena por la organizoj ,kiuj peradas.

Rilate al internaciaj respondkuponoj, la perantoj ne riskas perdi monon, ĉar tuj kiam ili ricevas la aliĝilojn, ili jam povas aĉeti la kuponojn. Tiamaniere la perantoj povas atendi trankvile la alvenonde novaj aliĝiloj, au sendi ilin al UEA, po mal-

grande.

Fakte, la perantoj ne kulpas pro tio, ke por Nederlando la respondkuponoj valoras nur 0,9 gld , dum por Ĉinio ili valoras 0,42 US\$ kaj por Heroldo ili valoras 20 bel-gaj frankoj. Faru la kalkulojn kaj konkludu vi mem , kio okazas . La sama respond-

kuponom valoras tute malegale, depende de la lando, kiu ŝanĝos ĝin.

Finfine, ni sugestas al tiuj, kiuj ankoraŭ dubas pri la seriozeco de niaj kalkuloj, ke ili provu iri al iu ajn ĵurnala budo, kie oni vendas eksterlandajn revuojn kaj konparu la prezojn aperintajn sur la kovriloj de la gazetoj kun la prezoj postulitaj de la vendistoj. Certe ili venos al konkludo, ke perado de esperantaĵoj ne estas tre bona negoco. Oni gajnas pli da kritikoj ol da amikoj.